

Eventoj

Redakcia adreso:
Budapest, pk. 87.
H-1675, Hungario.
Telefono kaj telefakso:
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado

marto (1) - '92

La unuaj vortoj

"... kaj kiel utiligi nian lingvoscion de Esperanto?" Verŝajne tiu demando estas la plej ofta frazo, kion eldiras la jusaj kursfinintoj. Kvankam estas centoj da ebloj, por scii pri ili, kaj utiligi ilin esence grava estas la informo.

La ideo "kiel eble plej ofta gazeto" ne estas io nova afero. Estis tiaj klopodoj de Teo Jung, provis ĝin Eckhard Bick per la Semajna Bulteno, kaj eksperimentis pri ĝi antaŭ kelkaj jaroj ankaŭ Budapeŝta Informilo.

Nun post la revolucioj en Orienta Eŭropo ni havas historian momenton. En tiu regiono troviĝas la plej multmembraj landaj esperanto-asocioj - tamen malgraŭ la plurfoja klopodo havi "ion komunan gazeton" la apertimo de la unuopaj revuoj pli kaj pli maloftas aŭ eĉ tute ĉesigas.

Eventoj estas en unika situacio. Post plurjara pre-parlaboro ni havas unikan datumbazon de esperantistaj adresoj, havas la kapiitalon, la komputeknikon, havas marketingajn fakulojn, relative favorajn ekonomikajn cirkonstancojn, - kaj havas teamon de spertaj esperantistoj, surbaze de kio ni decidis lanĉi la novan gazeton. Kvankam ni startas per 8 paĝoj dusemajne, ni havas realan planon aligi ĝin. La paĝonombro dependas nure de la nombro de abonantoj.

Pro la geografiaj distancoj, pro la orient-eŭrope draste altiĝintaj vojaĝkostoj, por plejmulto de esperanto-parolantoj restis la perpoŝta maniero teni la kontakton kun la movado. Samtempe, ĉefe dum la lastaj dek jaroj post la Raŭma deklaro, plejmulto de novaj kursanoj lernas la lingvon por poste iel utiligi ĝin en la praktiko. Ni ja volas helpi en tio, volas prezenti la diversajn eblecojn - kaj ni konscias, ke preskaŭ senescepte ili estas ligitaj al la t.n. movado.

Eluzante la dusemajnan apertimon ni volas publikigi aktualajn informojn pri renkontiĝoj, kongresoj, pri diversaj esperantaj eventoj, kaj Eventoj staros ankaŭ je via dispono. Aliflanke ni ĉerpos multajn informojn el la aliaj (pli ol 120) aperantaj revuoj, bultenoj, kaj intencas represi la plej interresajn artikolojn el ili.

Ni ne volas esti ĉio. Ni ne volas esti beletra, faka, scienca ktp. revuo, sed male, ni volas helpi al la legantoj, kiel trovi la beletrajn kaj fakajn eldonaĵojn, kaj kiel utiligi la fakajn asociojn.

Por kiu ni faras Eventoj-n? Ni celas ĉefe tiujn homojn, kiuj iam elermis esperanton, satus ĝin, sed ne havas la eblon (monon, tempon, energion ktp.) ĉiujare viziti 5-6 diversajn aranĝojn. Ni satus ligi kompreneble al la movado ankaŭ la jusajn kursfinintojn.

La unua numero estas iom alienhava, ol kutime ni planas ĝin. Tiu ĉi numero estas sendita al ĉ. 20 mil adresoj dise en la mondo. Ni scias, ke nur malgranda parto abonos la gazeton tuj, sed ni volis ke la materialoj estu utiligeblaj por kiel eble plej multaj.

Do, ni komencis. Ni atendas viajn sciigojn, informojn pri diversaj eventoj, por publikigi ĝin en Eventoj.

Starante je via servo




Szilvási László

Universala Kongreso en Aŭstrio

Post la kongresoj de 1924 kaj 1936, ni esperantistoj estis lastfoje en Vieno en 1970. Jen, do la kvara, rekorda fojo, ke Vieno donacas unu sian someran semajnon al Esperantujo (25.07-01.08.1992).

Kongreskotizo varias laŭ lando de la aliĝanto, aliĝdato (jam nur la 01-a de aprilo kaj surloke), aĝo, membreco, ktp. inter 90-315 NLG, kiu NE inkluzivas loĝadon kaj manĝadon. Pri tio okupiĝas pluraj vojaĝoficejoj kaj

Foto el la revuo Esperanto, No. 1032.



Kaj poste...

Antaŭ kaj post la UK abundas iom alispecaj renkontoj. Ne tiom amase, pro tio kelkaj eĉ preferas ilin. Ni mencias ĉiujn pri kiuj ni scias, foje ĉiujn kune en kalendaro. Jen kelkaj el ili:

Internacia Junulara Kongreso

La plej prestiĝa junulara renkontiĝo aŭspiciata de TEJO. Montrealo, Kanado, inter la 02-09 de aŭgusto 1992.

Partoprenkotizo: 225-350 CAD.

Simila (kaj mal-simila) al UK.

Temo: liber-tempo. (Ne estos nur liber-tempo, sed estos ankaŭ la temo: libertempo). Pliajn detalojn pri la programo kaj partopreneblo vidu sur paĝo 5.



Internacia Junulara Semajno

La plej internacia en mez-orienta Eŭropo junulara feria semajno. Esztergom (samloke kie pasintjare), Hungario, 03-09 de aŭgusto 1992.

Partoprenkotizo: 100-350 NLG.

Varia kultura kaj movada programoj. Organizas LINGVO-Studio kaj Hungara Esperanto-Junularo.

Petu aliĝilon de LINGVO-Studio: H-1675 Budapest, Pk.87, Hungario



Internacia Konferenco de ILEI

Faka konferenco por esperantistaj instruistoj. Bratislavo, Slovakio, 01-07 de aŭgusto 1991.

Partoprenkotizo inter 140 kaj 340 NLG.

Temo: Komenio - pioniro de la pedagogio. Kiom aktualas nun la avangardaj ideoj de Komenio, kaj nuntempaj avangardaj iniciatoj revoluciigi la instruadon de esperanto. Petu aliĝilon de: Bertil ANDREASSON, Södra rörum pl.455, S-242 94 Hörby, Svedio

Teorio

De Raŭma al Voss

Komencanto vane serĉas en sia vortaro signifon de la supre menciitaj du vortoj *Raŭma* kaj *Voss*. Ili estas urbonomoj, kiuj tamen estas memorendaj por eĉ iom klera esperanto-parolanto, por ne diri esperantisto. Ĝuste tial ili estas konendaj (kaj en estontaj esperantaj enciklopedioj certe nototaj) urboj, ĉar per ili estas stampitaj mejloŝtonaj deklaroj kiujn plej praktike estas nomi laŭ la urbo kie ĝi estis publike proklamita kadre de iu arango. Kompreneble ekzistas ankaŭ aliaj signifaj urboj kiel Bulonjo kaj Tireso. Sed ni vidu laŭvice kaj aktuale.

La fina urbeto Raŭma en 1980 famiĝis en Esperantujo, kiam kadre de IJK la Komitato de TEJO akceptis provokan deklaron nomitan la Manifesto de Rauma. Ĝi ŝokis la ceteran movadon pro sia rezigno de pri la "pracejoj" de esperanto kiel ĉies dua lingvo, uzado ĉe UN (Unuigintaj Nacioj), ktp. Anstataŭe ni ĝuu la lingvon kaj ties kulturon tiaj kiaj ili estas.

En la sekvinta jardeko raŭmismo iĝis ideologio kiu eĉ pluevoluis: tradicie oni varbis novulojn

plifortigi la esperantan premgrupon, kaj ĉiu estis objekto en kvante larĝiganta movado, dum raŭmismo oni estas subjekto en kvalite kreskanta kulturlingva komunumo.

En 1991 ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) kunvenis en Voss post la UK (Universala Kongreso de Esperanto), kaj kritike studis la Manifeston. Ĉefa konkludo estis, ke la moderna pluralisma evoluigo de la esperanta kulturo ne forfermas la klaskan celon de universala uzado ("fina venko") kvankam la idealo de ĉies dua lingvo ne estas realisma, ĉar eĉ la angla ne konkeris pli ol 8%-ojn de la homaro. La rezulto de la studoj dum la konferenco estis revizio de la Manifesto, per pli ekvilibra dukumento kiu ricevis la nomon Proklamo de Voss. Ĝi resumas la situacion de esperanto en la mondo 104 jarojn post la eldono de la unua lernolibro, kaj eble povos servi kiel strategia gvidilo por la venonta jardeko.

Por pli facile kompreni la Proklamon de Voss, ni vidu unue nun la Manifeston de Raŭma.

laŭ Norvega Esperantisto, 5/1991



Ivo Durwael, prezidanto de FEL

Dum la pasintaj jaroj, la estraro de FEL jam diversfoje parolis pri la apliko de merkato en nia asocio. Prave vi povus rimarki, ke vi ĝis nun apenaŭ malkovris konkretajn rezultojn. Mi vidas du kialojn:

– apliki merkaton egalas al ŝanĝigo de pensmaniero, kaj tio bezonas multan tempon, precipe ĉar ni estas volontuloj;

– unue ni menciis kelkajn el la tradiciaj kaj parte plej baldaŭ okazontaj. Sed la ĉefa kialo estas, ke ni plurfoje parolis pri la teoria flanko, sed forgesis kune traduki tion en konkretan fendaĵojn. Tial FEL organizis studotagon por ekzerci la ellaboron de agadplano por loka klubo, surbaze de merkato, sub gvidado de Kees Ruig.

Merkato ĉefe okupiĝas pri estonteco. Sed por montri al vi, ke temas pri relative simpla afero, mi mem (sola) provis apliki ĝin por raportoj pri la aktiveco de la pasinta jaro. Tio

estu nur ia demonstracio, ĉar normale merkato estu skipa laboro!

Unua solvendaĵo estas:

akiri klaran ideon pri la celo de la agado. Ni ofte ne bone scias kion volas akiri, nek kiel kaj kial. Merkatistoj konsilas por vortigi sian celon meze sur granda papero. Supre ni plenigu la spacon per ripeta demando, kial ni volas atingi tion, ĝis ni ne plu ricevas konvenan respondon.

Mi trovis jenajn respondojn:

CELO: disvolviĝo de esperanto en Flandrio.

KIAL ni volas tion: esperanto kontribuas al nia persona disvolviĝo; ju pli da adeptoj en nia ĉirkaŭaĵo, des pli grandaj estos niaj eblecoj.

KIAL ni volas adeptojn: individuo pli prosperas en eblecojn de niaj ideoj kaj niajn organizajn kapablojn.

La manifesto de Raŭmo

1. Krizo de identeco

La subskribintoj konstatis kontraŭdiron en la sinteno de la esperantistaro, kvazaŭ konflikto inter idea superego kaj egoo: nia superego igas nin prediki al la aliaj homoj pri kelkaj mitoj – la dua lingvo por ĉiu (la angla lingvo estas nia malamiko) UNO devas adopti esperanton ktp. – kaj laŭdegi la lingvon eĉ neobjektive okaze de intervjuo: samtempe inter ni,

ni ĝuas kaj aplikas esperanton laŭ tio, kio ĝi efektive estas, sendepende de la praelaj sloganoj. Tio ja estas krizo de identeco, kaj ni sentas la neceson motivi nian esperantistecon per io pli kohera.

2. Kritiko de pracejoj

Ni kredas, ke:

a) la oficialigo de esperanto estas nek verŝajna, nek esenca dum la 80-aj jaroj – oni havu alternativajn celojn;

b) la faligo de la angla lingvo estas nek tasko, nek zorgo de la esperantistoj; finfine la angla rolas kiel helplingvo, analogie al la franca siatempe (eĉ malpli grave ol iam la franca mem); Zamenhof neniam proponis al la Movado kiel celon kontraŭstari la francan, ĉar por esperanto li antaŭvidis pli valoran alternativan rolon.

3. Niaj celoj

Ni celas disvastigi esperanton por pli kaj pli, iom post iom realigi ĝiajn pozitivajn valorojn:

- a) propedeŭtiko por lingvo-instruado,
- b) kontaktoj inter ordinaraj homoj,
- c) kontaktoj sendiskriminaciaj,
- ĉ) **novtipa internacia kulturo.**

Lige kun la lasta valoro ni emfazas, ke la serĉado de propra identeco igis nin koncepti esperantistecon, kvazaŭ

aparteno al mem elektita diaspora lingva minoritato.

La kresko de niaj fortoj kaj aliĝo de novaj homoj estas nepre kondiĉitaj de la konsciigo pri tiuj ĉi valoroj.

4. La kongresoj kiel vojo al kresko

Internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj estas esencaj por la asimiliĝo de homoj al nia lingva komunumo

necesas unuflanke kongresi pli ofte inter ni, kaj rezervi la kunsidodon de gvidorganoj al apartaj funkculaj kunvenoj laŭ la modelo de la TEJO-seminario en Strasburgo (junio 1980), kaj aliflanke necesas

fortigi la uzon de esperanto kiel laborlingvo en fakaj konferencoj internaciaj laŭ la modelo de Freinet-instruistoj.

5. Ni kredas,

ke la unua jarcento de esperanto pruvis la taŭgecon de la lingvo por esprimi ĉion; meze de 80-aj jaroj, komence de la dua jarcento, ni devos ekmontri al la mondo, ke ni kapablas ankaŭ diri ion – ion kulture originalan kaj internacie valoran.

(dikigo de la red.)

Movado merkate

KIAL ni volas manifesti niajn kapablojn: por senti nin feliĉa, kontenta, gaja, plenergia, ĉar eluzi siajn talentojn estas ekzistokialo por homo.

Tiu ĉi pensekzerco necesas por esti kiel eble plej konsciaj, ke ĉiu ajn agado ne celu la progreson de esperanto, sed ke la progreso de esperanto estu helpilo por nia persona disvolviĝo kaj feliĉo. Tio validas por la organizantoj kaj por la klientoj!

Dua paŝo estas konkretigi tiujn dezirojn en agadojn, kiuj estas kiel eble plej konkretaj kaj tempe limigitaj, farante la demandon: kiel realigi ĉion; kien tiuj deziroj kondukos nin.

el Informilo 3/1991,

(monata revuo de Flandra Esperanto-Ligo)

Eble en aliaj mondpartoj la motivoj estas aliaj kaj la medio estas malsama, sed la konsiloj estas nepre atentindaj. (S.H)

Faka aplikado

UMEA Shinoda-kuracejo

En Krakovo (PL) funkcias Centro pri Orienta Medicino omaĝe al d-ro Hideo SHINODA, jam forpasinta Honora Prezidanto de UMEA. Kunposedanto de la kuracejo estas Masayuki SAJNJI, direktoro de la Internacia Instituto de Preventa Medicina Praktiko en Tokio.

Aplikata estas: **Orienta Speciala Diina Masaĝo, akupunkturo, ĉina masaĝo, klasika masaĝo** kaj aliaj.

La centro kuracas malsanulojn kaj organizas internaciajn kursojn por kuracistoj pri orientaj kuracmetodoj, ĉion en esperanto.

Esperantistoj el la tuta mondo povas interkompreniĝi kun kuracistoj kaj terapistoj en esperanto!

Kostoj: la tranoktado en hotelo kostas 4 USD/ tago (Kurackostoj momente ne estas konataj por la redakcio). Shinoda Kuracejo, ul. Centralna 32, PL-31-586 Kraków, Pollando, Tel: (+48-12)44-67-00 w.17.

Altermed Kft kuracas mov-organajn malsanojn

Alternativa Kuracmetoda centro – sub aŭspicio de UMEA – funkcias en Pápa (Hungario). Metodologia esplorado kaj aplikado de orientaj preventaj kuracmetodoj por restarigo de la korpo kaj la animo.

Kuracas malsanojn precipe de movorganaj, organizas kursojn en esperanto por kuracistoj, masaĝistoj, laŭ metodo de Masayuki.

Pliaj detaloj: Altermed Kft., H-8500 Pápa, Pf. 250, Hungario.

Mark FETTES

Ĉinoj komercas esperante

Almenaŭ unu novan samidenaon ni povas kalkuli inter niaj vicoj. *La pasinta semajno donis al mi tute alian rigardon al la esperantomovado* deklaris la urbestro de Oostende (Belgio) antaŭ kvindekda partoprenantoj en la esperanto-simpozio "Ĉinio aktive", la 5-an de oktobro 1991. *Mi ĉiam supozis ĝin movado de hobiistoj kaj stranguloj, sed nun mi spertis kiom da senco ĝi havas por komunikado kun plej malproksimaj landoj. La interpretado, kiun prizorgis la ostenda esperanto-klubo "La konko", estis inter la plej flua kaj kontentiga kiun mi spertis ĝis nun.*

Kio estis la kaŭzo por la urbestra konvertiĝo? La Juna Ekonomia Ĉambro de Ostende organizis ekspozicion de 120 ĉinaj firmaoj, kiuj serĉas komercajn kontaktojn en Eŭropo. La aranĝo ĝuis la subtenon de la belga registaro, kaj je ĉina flanko estis sub la aŭspicio de la Ĉina Teknologia kaj Komerca Korporacio "Hua Yang". Sed fakte ĉio kreskis el iniciato de profesoro Shen Chenru, la gvidanto de Scienc Teknika Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj.

Internacia Kultura Laborejo

japana komerca firmao proponas kunlaboron en kampoj:

eldonado de libroj en kaj per esperanto (ne voma-aspekta sed pli-malpli centpaĝa kun la temoj vere praktikaj kaj popularsciencaj, verkita originale kaj tradukita en bona kaj bela esperanto)

perado de informriĉaj kaj interesvekaj esperantaj libroj, revuoj, vidobendoj, k.s. eldonitaj en diversaj partoj de la mondo.

kunlaborado de komercaj fluoj trans diversaj landoj, per importado kaj eksportado de folkloraj, bonkvalitaj manlaboraj, malgrandaj kuriozaĵoj, ktp. (IKL helpas ekzemple disvendi la horloĝojn kun esperanto-marko fabrikita en Qingdao, Ĉinio.)

organizado de vojaĝoj studcelaj kaj distraj ligante esperanton kun movadaj aktivecoj kaj turismo.


Prezidanto: s-ino Senjo UMEDA + direktoro: s-ro Yosimi UMEDA I.P.O.B. 5458, Tokyo 100-31 Japanio, Telefono kaj telefakso: (+813) 3610-5882

Informilo pri Naturkuracado

Aperis la sesa numero de *ENA-informilo* (ne tro fantazia nomo). Ĝi informas pri la nova statuto de ENA (Esperantista Naturkuracista Asocio), nova estraro, pri 83 membroj kaj planoj por la unua ĝenerala kunveno.

Oni povas legi pri saniĝo per marŝado, saniga dieto el Irano, la 12 principoj por sana vivo de Porfirij Kornejeviĉ Ivanov, kaj pluraj pliaj interesaj. Interesatoj pri homeopatio, orienta medicino, akupunkturo, masaĝo, dietistiko, jogo kaj aliaj tradiciaj kuracmanieroj en diversaj mondpartoj. Petu provnumeron de la redakcio. Abono (membriĝo) kostas duonon de MJ-kotizo pagendan al UEA-konto seje-l. Sekretario: *Puramo Chong*

C.P.O. Kesto 3047, Seulo, Koreio



En la preparado oni uzis la lingvojn anglan, francan, nederlandan, ĉinan kaj esperanton. Tamen, esperanto ludis plenan rolon en la laboroj. La administrantoj de la korporacio sincere konfesas nun, ke esperanto nemalhaveblas en korespondado kaj intertraktado.

Ankaŭ la ĉeforganizanto ĉe la belga flanko, neesperantisto Thierry Koch, agnoskas:

– Kiam ni vojaĝis al Ĉinio por intertrakti kun firmaestroj tie, montriĝis, ke niaj ĉinaj interpretistoj havas grandajn malfacilaĵojn. Ni solvis ilin per la helpo de esperantisto.

Kees Ruig, konsilisto de la Komerca Ĉambro de Nijmegen (Nederlando) asertis:

– Esperanto estas moderna lingvo. Nur la esperantomovado estas malmoderna. Ĝi neniom progresis de jardekoj, ĉar oni forgesis, ke ekonomio estas la motoro de la socio. Nun vi, ĉinaj komercistoj malfermis epokon de praktika uzado.

Ni organizu similajn komercajn semajnojn kaj delegaciojn en aliaj landoj!

Profesoro Shen fermis la simpozion per kelkaj aŭdacaj proponoj:

– Ni kunlaboru en jenaj sep flankoj:
1. **Unu centro,** sub gvido de UEA aŭ IKEF, kiu ellaboros kaj realigos sian planon per delegitoj en ĉiu lando.

Esperanto en laborejoj

Multaj el ni estas neprofesiaj esperantistoj, nur en libera tempo ni okupiĝas pri ĝi, t.e. ni havas ie laborejon, ni estas fakuloj pri io.

Kaj ni ne ŝatas, se esperanto estas menciata nur kiel hobia.

Pro tio estas tute nature, ke ni publikigu la adresojn de niaj laborejoj, ke ĝi havu pere de ni esperantlingvajn kontaktojn en la ekonomia vivo. Tio ne ĉiam estas farebla kaj enda, depende de la speco de la firmao, kaj nia posteno tie. Sed kie eblas, ni faru! Ankaŭ vi sendu vian laborejan adreson!

Importa kaj Eksporta Komerca Kompanio Waylink, 3014 Ubi Road 1, 04-328, Singapore 1440, tel: 7490337, telefakso: (65) 74686566 telekso: RS 50048 WAY LK, ĝenerala direktoro Frederik ANG – eksportado de elektronikiloj, lumigiloj, medicinaj ilaroj kaj medikamentoj, komputaĵoj, teksaĵoj, maraj kaj aliaj nutraĵoj, ktp. laŭdeziro.

Tramontána GMK H-1026 Budapest, Júlia u.2/A tel + fakso: (+36 -1)156-6009, Gábor DEAK-JAHN – eldonado de porlernejanj lingvoekzerco-libroj, ludoj, komputila kompostado, PC-komputilaj fakaj konsiloj, komerco per komputilaj akcesoraĵoj.

Peranto BT, H-1136 Budapest, Sallai I.u.4, Hungario, Oszkár PRINCZ – turismo, libroeldonado, instruado, komerco per kulturaj varoj.

Kompanio "VIKTOR és ÁGOSTON KFT", H-1125 Budapest, Istenhegyi u. 50-52/C, Tel: (+36 -1)155-6710, Albert ÁGOSTON. **Importas:** kuracplantojn, -herbojn, aromaj kuracoleojn, biokosmetikaĵojn, naturenhavajn kuracilojn, naturkuracistajn ilojn, renomajn kosmetikaĵojn. **Eksportas:** vendas aŭ/kaj ekspozicias mane faritajn popolajn kaj modernajn bild- kaj objekt-artaĵojn. **Interesiĝas** pri ĉiu aspekto (negoca kaj senprofita) de la supre menciitaj temoj, ĉiuteren agentado, organizado.

LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, Pk. 87, Hungario, László Szilvási kaj Suzana Virág. Konsiloj pri ekonomiaj kaj impostaj aferoj, fondo kaj funkciigo de entreprenoj en Hungario.

2. **Unu merkato:** ni organizu similajn komercajn semajnojn kaj delegaciojn en aliaj landoj krom Belgio, nepre kun subteno de la registaroj kaj komercaj korporacioj.

3. **Unu universitato,** kiu per esperanto-kursoj en la naciaj universitatoj celu kulturajn sciencistojn, teknikistojn, ekonomikistojn kaj komercistojn kaj stimulu interŝanĝon.

4. **Unu eldonejo,** kiu redaktu kaj eldonu en esperanto librojn de scienco, tekniko, ekonomio kaj komerco, nomlistojn de industriaj kaj komercaj entreprenoj, katalogon de produktoj, ktp.

5. **Unu revuo:** kun helpo kaj subteno el diversaj landoj faru ni revuon *Tutmonda Scienco kaj Tekniko* ankaŭ revuo de la internacia ekonomia kaj komerca aktivado en esperanto.

6. **Unu informcentro,** kiu internacie kolektu utilajn informojn kaj efike servu al uzantoj.

7. **Unu fonduso por kolekti monon** en la internacia sfero kaj doni firman ekonomian bazon al la agado.

La supre menciitaj sep punktoj fakte estas "sistema inĝenierado". Kiam tiaj laboroj kunigiĝos, ili certe donos gigantan forton.

laŭ *Esperanto*, 10/1991

Movado

Pedagogia Altlernejo en Vraca (BG)

Esperanto egala aŭ egalrajta?

La universitata instruado de esperanto de longe havas firmajn tradiciojn. La unuan fojon en Bulgario ekde oktobro 1991 esperanto fariĝis regula studobjekto en la Pedagogia Altlernejo en urbo Vraca. Grandan meriton havas pri tio d-ro Emil Pavlov, kiu instruas tie, d-ro Kiril Velkov, vicprezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio kaj la konata dramaturgo Ljubomir Trifončovski, estrarano de BEA.

laŭ Bulgara Esperantisto nov/91

Ni esperu, ke baldaŭ la studentoj ekvidoblos en la movado. Ni legas, ke per tiuj paŝoj esperanto fariĝas tute *egala* lingvo kun la aliaj. Egale deviga (se jam elektita), egale altrudata, tial lernata sen entuziasmo kaj sekve poste forgesata. Eĉ malpli avantaĝe ol aliaj lingvoj, ĉar se oni ne okupiĝas pri la konscia posta flegado, la aplikeblecoj tre malofte venas mem. Gravus, ke esperanto fariĝu *samrajta* kun aliaj lingvoj, sed ne samspece instruata.

ŝ.H.

Monato – redaktoro ŝanĝiĝis

En la decembra numero de renoma nemo-vada esperanto-revuo aperis jena adiaŭa artikolo de la redaktoro Stefan MAUL:

"Post 12 jaroj de ĉefredaktoreco fine de la jaro 1991 mi rezignas pri ĉi tiu posteno.

Por tiu decido mi havas plurajn kialojn kaj motivojn, el kiuj la plej grava estas, ke kun kreskanta aĝo kaj pro mia sanstato mi ne plu eltenas la duoblan streĉon de plena profesia laboro en ĵurnalejo kaj de redaktado de monata revuo (dum liberaj horoj). Ŝajnas al mi, ke dum tiuj 12 pasintaj jaroj MONATO ne nur solidiĝis, sed ankaŭ konsiderinde pliboniĝis, tiel ke nun sendube ne plu estas risko, ke mi transdonas la respondecon al aliaj. Ekde la nova jaro redaktos la revuon teamo de pluraj geredaktoroj. Kunordigos ĉion kiel teknika redaktoro Paul Peeraerts en Antverpeno, kie estonte ankaŭ estos la centra adreso de la redakcio.

Mi mem ne komplete ĉesos labori por ĝi, sed restos kunlaboranto kaj estonte verkos pli multajn artikolojn ol tio eblis pasinte.

Stefan Maul

Dankon al Vi, Mark! esperanto

Mark Fettes, la ĝisnuna redaktoro de revuo *Esperanto*, per la januara numero finis sian deĵoron en la Centra Oficejo, kiel ĉefredaktoro de la centra organo de UEA. Li pasigis pli ol kvin jarojn ĉe la redakta komputilo, kaj ĉu vole aŭ nevole iĝis unu el la ĉefaj spiritaj motoroj de nia movado. La revuo sub liaj manoj monaton post monato iĝis ĉiam pli interesa, apenaŭ malhavebla por aktivaj esperantistoj.

Mi profunde komprenas la motivojn de la decido de Mark. Mi kaj nia redakcio dankas lian sinoferan ĝisnunan laboron, kaj esperas ne perdi la kontaktojn. Do ni ne adiaŭas, sed simple ĝisrevidas: Iam, ie en Esperantujo!

Szilvási László



Pigo-Studio en Stokholmo

Sendube Stokholmo fariĝas pli kaj pli la muzika centro de Esperantujo. Ĉijare ekfunkcios profesia muzika studio, establita de fervoraj esperantistoj, por esperantistaj muzikantoj, subtenante SENPAGAN profesinivelan registradon de esperantaj muzikajoj.

La studio troviĝas 12 minutojn de metroo, en kelo tri ĉambretoj. Estas planata komfortigo de la ejo por tranoktado.

Tom pri la aparataro por fakuloj-interesuloj: 16 kanala angla miksililo CMC-24, 16 kanala magnetofono FOSTEX 4050, samplero AKAJ MIDI S 612, sonlimigilo, kompresoroj, komputilo, kaj aliaj akcesoraĵoj. Planatas aĉeti 24-kanalajn miksilon kaj magnetofonon, sintezilajn cerbomodulojn kaj pli kapacitan samplilon.

La studio atendas provregistraĵojn kasede:

Esperantoforbundet, Vladimir Soroka, Brunsgatan 21, S-111 38 Stockholm, Svedio.

Mallonge

Stipendio por infanoj en devigaj lernejoj

Instruistoj-membroj de ILEI povas ricevi stipendiojn al infanoj en la deviga lernejo por partopreni en infankongreseto aŭ en simila arango, kie infanoj de diversaj landoj renkontiĝas kaj per Eo amikiĝas. Se vi deziras stipendion, bonvolu peti la regulojn de *Olle Olsson, Sdra Esplanaden 23, S-223 52 Lund, Svedujo. Bonvolu aldoni respondkuponon!*

Oazo-kreado en dezerto! s-ro J. Tilman Williams, eksurbestro de Gardena Bosko (Garden Grove), Kalifornio, Usono kaj grupo da samideanoj fondis senprofitan korporacion "Oazo de Esperanto" kies sola propraĵo estas 8-hek-tara terpeco en la kalifornia alta dezerto, ĉ. 200 km-ojn nordoriente de Losangeleso. Tiu ĉi terpeco estas bonkora donaco de s-ro Williams. La ĝenerala celo de la oazo estas krei veran oazon en la dezerto, oazon kiu ankaŭ estus internacia eduka kaj kultura centro.

Sed kiel krei el dezerta terpeco veran oazon? Estas bonvenaj realigeblaj proponoj: *Brian Neil Burg, Oazo de Esperanto, P.O.Box 1538, Garden Grove, CA 92642, Usono.*

23-26 aprilo, Expolingua, Havano, Kubo, Ekspozicio pri lingvoj kun tago de esperanto. Sendu kontribuaĵojn al: *Expolingua Habana, Organiza Komitato, Nacia Kapitolio, Pf. 2014, 10200 La Habana, Kubo.*

Eŭropa Kongreso en 1992

Laŭ iniciato de italaj esperantistoj kaj kun la subteno de Eŭropa Esperanto-Unio okazos komuna (okcident) eŭropa kongreso inter la 05-10. de junio 1992 en Verona, Italio.

La franca kaj itala landaj asocioj jam rezignis pri sia propra landa kongreso en tiu jaro, kaj pluraj aliaj esprimis sian subtenon.

Por provizora programo kaj aliĝilo skribu al: *Eŭropa Esperanto-Kongreso, Vicolo Ghiacciaia 3, I-37100 Verona, Italio.*

Ne okazos ĉi jare aprile la kutima TEJO/PSEK seminario en Polio! (laŭ Tejo Tutmonde 6/91)

Budapeŝta Universitato Eötvös (ELTE) daŭre ofertas siajn diplomigajn kursojn pri esperantologio kun daŭro de tri jaroj. Kondiĉo: jama universitata diplomo. Akcepta ekzameno en majo. Pliaj detaloj: *ELTE Interlingvistika Fako, d-rino Ilona Koutny, H-1364 Budapest, Pf. 107, Hungario.*

Konkurso

Belartaj Konkursoj de UEA en 1992 (limdato 31 de marto!)

UEA denove invitas verkemajn esperantistojn partopreni en Belartaj Konkursoj, kies kadro ĉi-foje estas aparte alloga; ja la rezultoj estos anoncigitaj en Vieno, unu el la mondaj ĉefurboj de kulturo kaj arto.

La konkurso konsistas el sep tradiciaj branĉoj kaj, eksperimente por la dua fojo, el vidbenda branĉo. La premiaj monsumoj estas plialtigataj.

La konkursanoj de ĉiuj branĉoj devas esti novaj kaj (escepte de la infanlibroj) ne publikigitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj:

Poezjo: Maksimuma longo nefiksita. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo 200 x 65 tajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma daŭro nefiksita. Tri premioj.

Eseo: Temo prefere ligita kun esperanto. Longo ĉirkaŭ 400 x 65 tajpospacoj. Premio Luigi Minnaja (unu).

Kanto: Teksto kaj melodio povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio An-okin (unu).

Fotografio: Temo ligita kun esperanto aŭ kun tiu de la UK en Vieno. Tri premioj.

Vidbendo: Temo prefere ligita kun esperanto. Maksimuma daŭro 30 minutoj. Sistemo VHS/PAL. Tri premioj.

Infanlibro de la Jaro: Originala aŭ tradukita libro aperinta en 1991. Unu premio.

Alsendo de la konkursaĵoj: Konkursaĵoj por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto estu senditaj en kvar ekzempleroj al:

Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Esperanto defendata

Kiu el ni ne havas proksimulon, jen parencon jen kolegon kiu pridubas la utilon de esperanto? Eble pro misinformiteco, aŭ eble ĉar li tute ne konas ĝin. Sed eble ni havas trafan respondon, kiun indus rakonti al aliaj samideanoj. Aŭ ni ne havas taŭgan respondon, kaj pro tio ni mem ankaŭ komencas pridubi. Ni rakontu tion al unu la alia! Skribu al ni – ke ni povu skribi tion al la aliaj. Sufiĉas ankaŭ nur kelkaj vortoj.

la redakcio

Arangoj

Partoprenu renkontiĝojn

Ĉar ne ekzistas Esperanto-lando, (aŭ alivorte ĝi ekzistas ĉie kie la parolanto de esperanto kunvenas), estas tre grave viziti tiajn renkontojn por renkonti la vivantan, parolatan lingvon. Ankaŭ povas esti utilaj la vizitoj en lokaj kluboj de la propra urbo, sed tiu kontentigas nur tre malmultajn, kiel montras la apenaŭ vegetado de multaj famaj esperanto-kluboj. Paroli kun samlandanoj (eĉ samurbanoj), ofte nacilingve pri temoj, kaj stilo farata de la hazarde esperanton parolantoj (aŭ nur simpantizantoj) ne hazarde maltentas entuziasman lingvopraktikanton, kiu ja lernis esperanton ĝuste por "malfermi al si la mondon". Bonŝancaj estas, kiuj krom praktikado de la lingvo mem havas ion komunan intereso-kampon, simpatias kun la samurbaj esperantistoj, kaj eĉ pli raras, ke en tiuj kazoj oni ne parolas nacilingve pro "praktikaj kialoj".

Tamen ia (foje nur letera) kontakto kun samurbanoj, samregionanoj ĉiukaze estas utila por almenaŭ esti informita pri la lokaj porokazaj utiligejoj de esperanto, ekzemple vizito de eksterlandanoj, aŭ iu loka movada aktiveco kiel manifestacio, kurso-organizado, libro kaj revuoabono por skribe ekzerci, uzi la lingvon

Por multaj, kiel parolebleco restas la loka klubo, se tia ekzistas. Sed kiuj povas permesi al si (finance, tempohavante, sane) partopreni esperanto-renkontojn, nepre faru tion! Kutime oni povas informiĝi pri ili tra la esperantogazetaro, kiun rolon ŝatus fari ankaŭ *Eventoj*. Estas tre grave kiel orientiĝi inter multaj, similnomaj, sed en ĉiu vidpunkto tre diversaj renkontoj.

77-a Universala Kongreso de Esperanto

25.07 – 01.08 1992, Vieno, Aŭstrio

Organizata de UEA (Universala Esperanto-Asocio), la kongreso okazas ĉiujare alilande dum unu semajno.

Kongreso ĝi estas nur por la Komitato de UEA (kiel parlamento, la decidorgano delegita de landaj asocioj kaj individuaj membroj), krome kunsidas tie vico de fakaj asocioj kaj komisionoj de UEA.

Ĝi ankaŭ estas festivalo kun kulturaj programoj kaj manifestiĝo por la ekstera mondo, kutime pritraktante temon ne rekte esperantan sed gravan ankaŭ por eksteruloj.

La 77-a Universala Kongreso okazos en tempo de grandaj ŝanĝoj en tuta Meza Eŭropo, kaj ĝi estos ankaŭ iusence komuna kongreso de la movadoj en tiu regiono: krom la Loka Asista Komitato, kunlaboros internacia teamo el la najbaraj landoj. En la lastaj jaroj, la aŭstra movado baraktis kun niaj tradiciaj problemoj, kiel maljuniĝo de la aktivuloj kaj malkresko de la publika intereso. La kongreso espereble helpos ĝin fortiĝi kaj kreski, baldaŭ regajnonde sian iaman renomon kaj influon.

Invito al Montrealo

La plej prestiĝa junulara renkontiĝo, IJK aŭspiciata de TEJO ĉijare okazos en Montrealo, Kanado, inter la 02-09 de aŭgusto 1992.

Tie kutime okazas la oficiala kunveno de la Komitato, la parlamento de TEJO. Tial ĝi estas kongreso. Dum la komitatkunsidoj okazas elekto de la estraro, akcepto de raportoj kaj diskuto pri estonta agado sub la nomo TEJO.

Por nekomitatanoj IJK estas interesa festivalo kutime kun kulturaj kaj fakaj eventoj, pelegoj, surpodiaj spektakloj, ekskursoj. Eblas renkonti estraranojn, influhavantojn por la movada nuntempo, eblas informiĝi pri planataj aktivecoj, membriĝi en komisionoj de TEJO laborantaj dum la jaro pri specifaj terenoj. Kaj nelastvice eblas konatiĝi kun la gastiganta lando, ties esperantistoj, problemoj, ĝojoj, esperoj, turismaj vidindaĵoj. Tial ĝi povas esti interesa ankaŭ por via (ankoraŭ) neesperantista amik(ino), por konvinki, ke ankaŭ ŝi/li venu anstataŭ forlogi vin alien. Sed tiaj amik(in)oj ne venu solaj, t.e. sen vi kiu enkondukos ilin lingve-movade, ĉar alie estus amaso da krokodiloj, tute ne ĝuantaj la programojn. Do, unuavice IJK (kiel UK) estas por la jam parolantoj.

Al IJK-j kutime kunvenas 100-1000 partoprenantoj, tre varie laŭ kongreslando, atingebleco por aliuloj. Tion ĉefe kaŭzas la eŭrocentrismo trajto de la esperanto-movado.

Temo: libertempo. Eble troveblus pli da gravaj temoj nuntempaj, sed vidante la ne ĉiaman entuziasmon de partoprenantoj pri mondskuaj problemoj en tamen feriaj tempoj, la organizantoj eble proponis ĝuste tion. Ne nur praktiki, sed ankaŭ paroli pri tio.

Tuhazarde (?) okazos multaj urbaj festoj dum la kongreso por la 350-jariĝo de Montrealo, ekskurso al indiana vilaĝo, gustumo de

tradicia manĝo (kun vera neĝo konservita de vintro!)

Kongresejo: *Cégep Maisonneuve*, kelmil-persona studenta kolegio, inkuzive sportejoj, apud metroostacio.

Por malatigi kongreskotizon la kongresanoj dormos surplanke en klasĉambroj sur matracoj, duŝejo apude. Kunportu dormsakon! Provu foje, kiu ankoraŭ ne faris! Eble malpli komforta, sed multe pli familiare estas la kunronkado de (eble eĉ) 100 homoj samĉambrege. Se oni alkitimigas al kelkaj kunvivaj reguloj (lumo, bruo), estas facile elteneble. La LKK reklamas ĝin tiel: "*Cetere, kiu volas dormi dum IJK?*" Por aliemuloj eblas kontakti ankaŭ hotelon.

Partoprenkotizo: de 225 ĝis 350 CAD depende de transpago-dato (por netranspagipovuloj de aliĝilo-alven-dato) kaj aĝo de la partoprenanto. La limdatoj: 01.04.92, 15.06.92, kaj surloke.

Flugkaravano estas organizata de la LKK precipe por studentoj kun granda rabato de Bruselo (Eŭropo). Pri la aktuala stato de mandu LKK, aŭ legu en *Eventoj*.

Aliĝilon petu de multaj asocioj, el lokaj bultenoj, CO de UEA, aŭ rekte de:

LKK de la 48-a IJK
6358-A, rue de Bordeaux
Montréal, Québec
Kanado H2G 2R8



Ni ne neglektu mencii, ke la kongresejo de la 77-a UK estos unu el la plej modernaj kaj taŭge ekipitaj kiujn ni ĝuis ĝis nun. Speciale alloga estas ĝia situo, meze de la domaro de Unuiĝintaj Nacioj en Vieno kaj nur ok minutojn for de la urbocentro per rekta metroa ligo.

Aŭstrio

...iama politika, nuna turisma grandpotenco. Ĝi foje regis, regis, imperiestris, ĉefrolis en Eŭropo. Ĝi regas ankaŭ nun sur alia tereno: la arto adaptiĝi kaj trovi sian lokon en la nova mondo. Landeto fakte, kiu fariĝas landego ĉiusomere pro turistaj invadoj al la vienaj kaj salcburgaj festivaloj, kaj ĉiuvintre pro insbrukaj skiejoj, aŭ tutjare pro kialo i.a. ekzemple en 1991 pro la Jaro de Mozart. Landego ankaŭ laŭ kulturo kaj intelekto: ĉi jarcente jam dudeko da nobelpremiitoj, inter ili la esperantisto Alfred Hermann Fried (1864-1921) pacpremio, 1911).

La aŭstria esperanto-movado havas longan historion. Jam en 1902 aperis la unua esperanto-revuo en la tiama Aŭstro-Hungara regno; en 1903 Fried (jam menciita) eldonis faman lernolibron; la postan jaron okazis la unua nacia kongreso de esperantistoj. Aŭstroj estis en Buloj (la unua Universala Kongreso en 1905), ili partoprenis en la fondo de UEA, kaj ankaŭ ili spertis la tragedian baton, kiun alportis la milito. Poste ili evoluis ĝis unu el la plej signifaj

movadoj de Eŭropo — aparte laŭ la nivelo de siaj aktivuloj. El tiuj du iĝis eĉ mondaj figuroj. Eugen Wüster (1898-1977), la fondinto de la internacia normigo-scienca, multe kontribuis ankaŭ al la frua esperantologio, dum gvidanto de la aŭstria laborista esperanto-movado. Franz Jonas (1899-1974), fariĝis en 1965 la prezidento de Aŭstrio.

Laŭ *Unua Bulteno de 77-a UK*

...tuj post la UK, je 180 km-ojn de Vieno 03-09 de aŭgusto, Esztergom, Hungario.



Partoprenantoj kutime el 15-20 landoj.

"Juna estas tiu, kiu sentas tia..."

Petu aliĝilon de *LINGVO-Studio*

H-1675 Budapest, Pk. 87.

Recenzoj

Kiel diskonigi vian asocion

tradukis *Germain Pirlot el la franca. Eld. UEA, 1991, p.24, prezo: 3NLG ĉe librosevo de UEA*

Unu el la fundamentaj zorgoj de ĉiu movado estas la transdono de informoj kaj spertoj, t.e. la trejnado de siaj aktivuloj. Tio estas aparta problemo por internaciaj movadoj, kies anoj nur malfacile renkontiĝas kaj devas labori en tre diversaj kondiĉoj.

La konsilaroj traktas bazajn problemojn de libervola organizado kaj kunagado.

Varbi por viaj aranĝoj – Rilati kun la gazetararo, radio, televido – Informi anaron – Realigi afiŝon, flugfolion, ekspozicion – Starigi jaran agadplanon.

Kvankam unuopaj konsiloj povas havi nur limigitan aplikeblon (depende de lokaj kondiĉoj), ĉiu aktivulo povas trovi en ĝi multajn utilajn sciojn por sia propra agado. La konsilaroj estas nur bazo. Indas organizi seminariojn pri apartaj temoj, kiujn ili tuŝas; indas ampleksigi kaj detaligi ilin por difinita publiko.

Se vi jam scias ĉion pri la menciitaj temoj, tiam vi ne bezonas ĝin. Alie nepre estas rekomendinda havi ĝin.

ŝ. H.

AL VENKO

- muzika sonkasedo en esperanto
- lirikaj, kaj primovadaj kantoj
- (i.a. Zamenhof, Deij, Baghy, Schwartz)
- aparta tekstolibro kun muziknotoj
- Prezo: 21 NLG + 10 % sendokostoj
- Eldonis LINGVO-Studio,
- H-1675 Budapest, Pf. 87, Hungario

Unua Ĉeĥa Studsesio de AIS daŭrigos

la Comenius-Konferecon '92

Karla Universitato Praha kaj Comenius Universitato Bratislava organizas en kunlaboro kun UNESCO, kun Ĉeĥ-Slovaka Akademio de Sciencoj kaj parte (por la sekcio 3) ankaŭ kun AIS Internacian Konferencon "La heredaĵo de Comenius kaj la eduko de la homaro por la 21-a jarcento".

La konferencon aŭspicias la prezidanto de ĈSFR, Václav Havel; konferencestro estos la rektoro de la Karla Universitato, prof. d-ro Radim Palous. Dato: 23.03-27.03.1992.

AIS provsesio apud Prago

Tuj post la internacia Comenius-konferenco (27.03-04.04.1992) okazigos AIS sian provsesion cele starigon de la Ĉeĥa filio de AIS, al kiu Karla Universitato intertempe jam havigis buroon kadre kadre de la Klerigteknologia Katedro de la Pedagogia Fakultato. La fakultato disponigos idealajn kongreslokojn en sia branĉo *Brandys nad Labem/ Stara Boleslav*, dudek kilometrojn nord-oriente de Prago.

Okazos: esperanto (aŭ ILO, t.e. Internacia Lingvo AIS-dialekte) lingvokursoj por komencantoj kaj progresintoj, kunsidoj de la senato, de la ekzamenoficejo, de sektoroj Subtena, Arta kaj Teknika kaj de la fakaroj de la Scienca Sektoro.

Speciala celo de la prov-SUS estas malfermi la registron de la sciencistaj gradoj kaj titoloj agnoskitaj de la AIS kaj validaj tiel ankaŭ en la Ĉeĥa Respubliko. Estas afable petataj speciale ankaŭ ĉiuj profesoroj, docentoj, adjunktoj kaj liberaj membroj de la Internacia Scienca Kolegio (ISK) de AIS helpi al la pliperfekta kaj al la reputacio de nia sistemo per adapta adoptigo de siaj ekster AIS akiritaj sciencistaj gradoj.

La venonta limdato por SUS en San Marino: 03.04.1992.

Pliaj informoj: ĉe AIS, Kleinerberger Weg 16b, D-W- 4790 Paderborn, Germanio.

Korespondi deziras

Amemasso Ekpe, s/c Mensah Eddyssé, B.P. 2172., Lomé Togo-lando Kun esp-istaj franglingvanoj, por progresi en la studado de la Int.Lingvo.

Ahliakpor Komlavi, s/c Amozou Efoe B.P. 2104., Lomé Togo-lando kun 20-50 jaruloj.

Kovnator Naum, Kaiju 42-6., 229700 Liepaja Latvio, tm. pri dt, precipe pri E-instruado, tradicioj, kuirarto, historio, politiko, ludoj kaj infanedukado. Kolektas bk kaj esp-afojn.

Ngonda Ewbawwa Athanase, B.P. 975., Kin-Limete Zairio komencanto dez kor. tm. pri div.temoj precipe pri kulturo, vojaĝoj kaj turismo.

Katharina Richter, str. der DSF 24., D-W-2820 Hagenow Germanio pri lingvoj, literaturo, muziko, dancarto.

Jana Švirgová, Vasjučenka C-4., CS-69151 Lantzhot, Ĉeĥ-Slovakio, pri historio kaj muziko.

Jolanta Jakubczyk, str. Jagielly 7D/36., PL-14-100 Ostroda Polio; botaniko, zoologio, geografio, arto-historio. Dez. interŝangi pm., bk. turismajn prospektojn.

geedzoj C. & A. Jong, Roland Holsstraat 69 B., NL-4819 HN Breda Nederlando, Manouli Mohamed Ossefoua, BP. 388., Ouagadougou Voltaland Burkina Faso.

Judit Szabó, Tolbuchin u. 12., H-2131 Göd, Hungario. Ŝatas legi, kudri kaj kajakadi. Kor.dez. kun 16-17 jaraj britaj aŭ francaj geknaboj.

Katalin Pordány, Eötvös u. 12., H-7013 Cece, Hungario. Kor. dez. kun usona aŭ sveda knabo 17-20 j.

József Csóka, Petőfi u. 9., H-4164 Bakonszeg, Hungario interesiĝas pri desegnado, korespondado, aforizmoj, anekdotoj kaj pri bk. Dez. kor. kun Usonanoj, japanoj germanoj aŭ kun ĉinoj.

E-grupo "Alfabeto" gvid. Borisz Hanukajev, ul. Aziza Aseva pr. 4, d. 4., Mahackala-Respul 367015 Rusio, Dagestan 22 gimnazianoj, 14-17 jaraj serĉasleterkontaktojn kun diversaj partoj de la mondo.

Koresponda Servo Mondskala

*Francois Xavier Gilbert
Vert Coteau, Longeville en Barrois
F-55000 Bar-Le-Duc, Francio*

Kiel aboni Eventoj-n?

1. Plenigu la abonilon sur paĝo 8. kaj sendu ĝin al la redakcio (LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, Pk.87, Hungario).
2. Pagu la abonkotizon al vialanda peranto listigitaj apude en la koncerna nacia valuto kaj sumo.
3. La revuon vi ricevos perpoŝte rekte el Hungario.

Kiel pagi

- Sendu la kotizon al vialanda kotizperanto (perpoŝte aŭ postgirkonte) - en nacia valuto.
- Sendu la monon rekte al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, kodo ELLS-S, NL-3015 BJ Rotterdam.
- Sendu la monon rekte al la redakcio per simpla internacia poŝtmandato, aŭ perbanke al Banko OTP, Budapest XVIII, Konto 218-98189/ 542-030808-7
- En fina kazo - je via risiko - sendu la monbiletojn (en konvertebla valuto inkluzive forintojn) en fermita koverto al la redakcio.

Landaj kotizperantoj

- Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg (pĉk. 7.127.144).
- Brazilio:** Brazila Esperanto-Ligo, Carlos Maria, Cx. Postal 03625, Brasilia-DF, 70084.
- Britio:** Paul Hewitt, 26 Higfield Rd, North Thoresby, Grimsby, S. Humbs, DN36 5RT.
- Ĉeĥo-Slovakio:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Vladimír Dvůrzak, Jilská 10, CS-110 00 Praha-1.

Danio: Eckhard Bick, Rugbjergvej 98, DK-8260 Viby-J.

Francio: UFE, Louise Marin, 4. bis, rue de la Ceresaie, F-75004 Paris (pĉk. 855-35 D Paris)

Germanio: Alfred Schubert, Pf. 1539, D-W-8120 Weilheim, (konto: 365255-806, postgiroamt München, BLZ 700 100 80).

Hungario: LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, Pf. 87. (konto OTP Budapest XVIII. 218-98189/542-030808-7).

Hispanio: Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila 127, p.7, 2º izda, E-39007 Santander (Cantabria) (Bankkonto ĉe Caja Postal n-ro 03548531 (O.P.))

Israelo: Aviv Faklieru, P.k. 8383, IL-61083 Tel-Aviv, (konto 403679 Bank Mizrahi, Faklieru Esperanto).

Italio: Itala Esperanto-Federacio, via Villaresi 38, I-20143 Milano (pĉk. 37312204).

Korea Respubliko: Lee Jung-kee, C.P.O. Box 3047, Seoul

Polio: P.W.H. NEPO, skrytka 105, Maciej Wnuk, ul. Broniewskiego 77, m. 137, PL-01865 Warszawa.

Portugallio: Libroservo de Portugala Esperanto Asocio, Antonio Martinus, Rua rd. Joao Conto 6, R/C-A, P-1500 Lisboa.

Sud-Afriko: Colin Beckford, P.O.Box 1227 Cape Town, 8000.

Venezuelo: Prof.J.E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.

		Eventoj surface	Eventoj aere
Austrio	ATS	295	340
Brazilo	USD	13	15
Britio	GBP	15	17
Ĉeĥo-Slovakio	KCS	280	-
Danio	DKK	170	195
Francio	FRF	150	170
Germanio	DEM	45	52
Hungario	HUF	780	-
Hispanio	ESP	2900	3300
Israelo	USD	15	17
Italio	ITL	29000	33000
Korea Resp.	USD	13	15
Polio	PLZ	150000	170000
Portugallio	PTE	3700	4300
Sud-Afriko	ZAR	70	80
Venezuelo	USD	13	15
ĉiuj aliaj landoj	NLG	49	56

Anoncetoj

Tria Internacia Koresponda GO-Turniro

EGLI (Esperantista Go-Ligo Internacia) alvokas ĉiujn Go/Veĉi/Baduk-ludantojn esperantistajn partopreni en tutmonda Go-turniro. *Mattias REIMANN, Platz der Freiheit 20, D-O-5503 Ellrich, Germanio*

Esperanto-Centro en Poprad ofertas sian kongresejon por unuopuloj kaj grupoj, ĉu lernejoj, ĉu laborejoj, movadaj. Tranokto 66 KCS, 3-foje manĝoj 90 KCS/tago. Dispone al vizitantoj estas kuirejo, fajrejo, buso kaj buseto, proksimaj belaj ekskursejoj. Pliajn detalojn petu de: *Slovakia E-Asocio, Sloboské nám. 6, CS-05801 Poprad, Ĉeĥo-Slovakio*

Adventistoj vivas pli longe ol aliaj personoj. Kial? Ekkonu la sekretion pri ili pere de senpaga Biblia kurso ĉe Krystyna Poreda, S.P.70, PL-43-100 Tychy, Pollando

Kroacia Esperantista Unuiĝo ofertas pliajn gastigantojn de PASPORTA SERVO, kies adresoj ne povis aperi en la aktuala adresaro pro mal-fruo, pro milito. *KEL, Marija Belošević, Trg burze 2, HRV-41000 Zagreb.*

Por via notlibro

Jen adresoj de kelkaj antaŭnelonge fondi-taj esperanto-asocioj. Kontakti ilin!

Nepala Esperanto-Asocio, Quest Language Institute, Kamalpokhari, Kathmandu, Nepalo
Singapura Esperanto-Asocio, c/o 372, East Coast Rd., 1542 Singapore

Tajvana Esperanto-Asocio, Wang Chung-Yi, No.13, 2 Alley, 40 Lane, Chung Yung Street, Shih Lin, Taipei, Taiwan

Anatolia Esperanto-Asocio, Bekir Karayel, Bogaz Sok, 22/3 Gaziosmapasa/ Ankara, Turkio. Telefakso: +90-4-1678184

Bangalora Esperanto-Centro, c/o s.s Pradhan 97, 24th cross, III Block East, Jayanagar, Bangalore, 560011 Hindio

Malajzia Esperanto-Asocio, sekretariino f-ino Siva Devi, 42 Lorong Kampong Pandan, 55100 Kuala Lumpur, Malajzio

Esperanto-Grupo de Porto Moresbio, c/o John Shadiow, Geography Department, University of PNG, Box 320, N.C.D., Papua New Guinea

Esperanto-Grupo de Bangkok, c/o Pho Tham-hajadpaikun, 42, Arcesamphan 5, Rama 6 Rd., Phayathai, Bangkok 10400, Thailando

Lingvo

Kompreneble ankaŭ aliaj rajtas kontribui, nur ĉi estu ne pli longa ol ekzemple la ĉi suba.

Bernard GOLDEN

La slavismo "je la nomo de"

Slavismoj estas vortoj kaj esprimoj uzataj en esperanto laŭ neinternacia maniero pro lingvaj kutimoj de homoj, kies gepatra lingvo apartenas al slava lingvofamilio. Slavismoj estis uzataj tre frue en la historio de la Internacia Lingvo, eĉ de Zamenhof mem. Rimarko en Plena Ilustrita Vortaro (PIV) klarigas, ke "la Zamenhofa uzo de mueli en la senco 'sensesence babili' estas evitenda rusismo".

La sekvaj citaĵoj ilustras alian slavismon:

a. *"Teatro je la nomo de Antoni Grabowski el Varsovio"*


b. *"... la centra regiona biblioteko je la nomo de Puŝkin..."*;

c. *"... Samarkanda Ŝtata Universitato je la nomo de Aliser Navoj..."*;

d. *"Moskva publika biblioteko de la nomo de Lenin"*.

Tiu maniero indiki la nomon de institucio aŭ organizo havanta en sia titolo personan nomon estas tipe rusa kaj pola. En la rusa titolo *Biblioteka imieni Lenina* kaj la pola *Uniwersytet imienia Adam Mickiewicza*, la vortoj - *imieni* kaj *imienia* signifas "laŭ la nomo de". Jena ekzemplo troviĝas en la rusa-esperanta vortaro de Bokarev: *zavod imieni Kirova* - uzino (je la nomo de) Kirov". La enkrampigo de "je la nomo de" indikas, ke ĝi ne estas bezonata. Uzino Kirov sufiĉas, same kiel Biblioteko Lenin kaj Universitato Adam Mickiewicz. Apogo de tio estas la nomformoj en alilingva traduko. Jen la anglaj versioj: V.I. Lenin Library kaj Adam Mickiewicz University. La sekvaj ekzemploj ĉe UEA ilustras akcepteblajn formojn: Biblioteko "Hector Hodler", Fondaĵo "Canuto", Societo "Zamenhof" ktp. La personaj nomoj apartenas al iniciatinto, fondinto aŭ honorita persono. Se oni volas indiki, ke temas pri ies privata loko aŭ organizo, oni metu la prepozicion "de" antaŭ la persona nomo: la biblioteko de Hector Hodler, la ĉambro de Stefano La Colla, ks.

el Kooperativa Stelo, 1991.



Movada lernejo

kotizoj:

aliĝkoto: kutime estas mono pagenda por rajti ĉeesti la renkontion (por la "etosoj") kun kongresaj dokumentoj, nomŝildo, enirbiletoj. Ĝi ne signifas antapago.

partoprenkoto: inkluzivas kaj la aliĝon (iujn ĝi supre menciitajn servojn) kaj ĉiuj aliajn bazajn servojn dum la restado, kiel manĝoj, tranoktado kaj povas inkluzivi foje transporton (dum la renkontiĝo mem, inter programejoj), sed ekskursojn de la renkontiĝejo aliloken nur se aparte menciitaj.

restadkotoj: plejparte signifas manĝo- kaj tranoktokotojn, tiel, ke aliĝkoto + restadkotoj = partoprenkoto, sed ankaŭ okazas, ke organizantoj ne aparte kalkulas programkotojn, sed tio jam inkluzivas en restadkotoj, aŭ nur kotizo, kutime se la organizantoj ne volas oferti partoprenon nur al la programo (vd. memzorgantoj).

antaŭpago: por pli certigi aliĝon, mendon de ajna servo, ĝi povas concerni ajnan specon de kotizo, ajna procento de ĝi dependas de lokaj kondiĝoj.

memzorgano: tiu, aliĝis kaj partoprenas la renkontigon sen pagi kaj sen ricevi manĝojn kaj tranoktejojn. Kelkloke tamen estas ofertata amasloĝejo, kiel planko en gimnastikejo por krompago.

Lastminute

Latvia Internacia Printempo (LIP-92) 30.04-05.05.92, Latvio

Agrable alloga estas la partoprenkoto (\$ajne por eksterlandanoj): 20 USD. (Laŭ Koncize novdec/91). Espereble ĝi inkluzivas ĉiujn kotojn de la restado.

Okazos laŭplane: prelegoj kaj diskutoj pri kulturaj, sciencteknikaj, ekonomiaj aferoj, komerco kaj turismo; ekskursoj al Riga, Jurmala kaj Singulda, belarta konkurso.

Pliaj informoj: *Latvia Esperanto-Asocio, P.k. 150, Riga 50, Latvio*
 Tel: 361395, telefakso: 555983.

Antaŭkongreso de UK en Prago

La antaŭkongreso de la ĉi-jara UK okazos en la 'najbara' ĉefurbo Prago inter 19.07.91 kaj 25.07.91.

La semajna programo antaŭvidas interesajn ekskursojn en la milvizaĝa urbo, al banlokoj, okazos internacia seminario pri Komenio, muzikaj koncertoj, distraj kaj amuzaj eventoj, - do vere bona okazo por interkonatiĝi antaŭ la vienaj tumultoj. La prezoj varias depende de la loĝkategorio kaj aĝo.

Esperantistoj el la ekssocialismaj landoj, el Azio kaj el Afriko plus la gejunuloj ĝis 26 jaroj el ĉiu lando havas specialajn rabategojn! La orientigaj prezoj: restado en hoteloj kostos 1290 NLG (kun kompleta priservo), la kotizo por 'nepagipovaj' landoj kaj por gejunuloj en studentelimo estas inter 105 kaj 170 NLG. (Pli detalaj informoj en la postaj numeroj).

Petu pliajn informojn, kaj aliĝilojn ĉe: Ĉeĥa Esperanto Asocio, str. Jiiska 10, Prago 1, CS-110-01, Ĉeĥo-Slovakio.

Pasporta Servo 91/92

Centra distribuanto:
Thorsten LEMKE, Wetterseestr.1
D-O-1100 Berlin, Germanio
 Konto: 2944204842 Berliner Sparkasse
 Prezo: 12 DEM inkluzive sendokoston

EVENTOJ, esperanto nyelvű információs lap.

Nyt, sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 1215-959 X.

A kiadó és a szerkesztőség címe:

1875 Budapest, pf. 87. Tel: 1288258.

Megjelenik kéthetente. Terjeszti a HELIR.

EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.

Eldonas Kultura Esperanto-Asocio

kaj LINGVO-Studio, Budapest.

Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvési.

Teknike redaktas Sándor Hideg.

La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavo.

Ni fieras esti esperantisto...

Ricevite

Elsendohoroj en UTC Univerala (Grenviĉa) Tempo.

Mez-eŭropa vintra tempo = UTC + 1 horo

Pliajn informojn pri la programoj petu rekte ĉe la redakcioj. Viaj komentoj pri la aŭdebleco kaj enhavo estas bonvenaj al la redakcioj kaj helpas altigi ilian reputacion, foje eĉ pluviron.

ĈIUTAGE

11.00-11.30 Pekino, (por Japanio kaj Koreio) 43.13m (6955 kHz), 31.64m (9480 kHz). Radio Pekino, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.

13.00-13.30 Pekino, (por Sudorienta Azio) 25.75m (11650 kHz), 19.78m (15165 kHz).

14.30-14.55 Varsovio, 31.50m (9523 kHz), 41.18m (7285 kHz), 41.99m (7144 kHz), 48.90m (6135 kHz), 49.22m (6095 kHz), 200m (1503 kHz). Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.

20.00-20.30 Pekino, (por Eŭropo) 40.51m (7405 kHz), 40.16m (7470 kHz), 30.10m (9965 kHz).

21.30-21.55 Varsovio, 200m (1503 kHz), 49.22m (6095 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.99m (7144 kHz), 41.18m (7285 kHz).

22.30-23.00 Pekino, (por Centra kaj Suda Ameriko) 31.64m (9480 kHz), 31.50m (9525 kHz).

LUNDE

13.30-13.40 Bern, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

23.00-23.30 Vilnius, 25.45m (11790 kHz), 21.99m (13645 kHz), 19.76m (15180 kHz), 19.41m (15455 kHz), 19.37m (15485 kHz). Nur kvar minutoj (kutime la finaj) kadre de anglalingva elsendo. Litova Radio, Esperanto-fako, LT-232674 Vilnius, Litovio.

MERKREDE

07.45-07.55 Bern, (por Malproksima Oriento kaj Pacifiko) 31.38m (9560 kHz), 21.92m (13685 kHz), 16.98m (17670 kHz), 13.83m (21695 kHz).

10.45-10.55 Bern, 22.00m (13635 kHz), 19.27m (15570 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.78m (21770 kHz).

13.15-13.25 Bern, (por Proksima Oriento kaj Azio) 40.11m (7480 kHz), 25.65m (11695 kHz),

22.00m (13635 kHz), 19.27m (15570 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.83m (21695 kHz).


15.15-15.25 Bern, (por Proksima Oriento kaj Orienta Afriko) 21.92m (13685 kHz), 19.44m (15430 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.87m (21630 kHz).

17.15-17.25 Bern, (por la tuta Afriko) 30.35m (9885 kHz), 25.09m (11955 kHz), 19.32m (15525 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.78m (21770 kHz).

22.15-22.25 Bern, (por Suda Ameriko) 30.58m (9810 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz), 19.27m (15570 kHz).

ĴAŬDE

01.15-01.25 Bern, (por Centra kaj Suda Ameriko) 48.98m (6125 kHz), 48.90m (6135 kHz), 31.09m (9650 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz), 16.92m (17730 kHz).



03.15-03.25 Bern, (por Norda Ameriko) 48.90m (6135 kHz), 31.09m (9650 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz).

05.40-05.55 Vatikano, 186m (1611 kHz), 48.50m (6185 kHz), 40.70m (7365 kHz), kaj FM 96.3 MHz. Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

13.30-13.40 Bern, kiel lunde.

13.30-14.00 Budapeŝt, en multaj frekvencoj (de la radioprogramo *Kossuth*) en la t.n. orient-eŭropa FM-bendo (OIRT: 62-74 MHz). Regiona aŭskultlebo

21.20-21.30 Tallinn, 290m (1035 kHz), 50.63m (5925 kHz). Estona Radio, Esperanto-fako, EST-200100 Tallinn, Estonio.

22.30-23.00 Vilnius, 451m (666 kHz), 49.18m (6100 kHz). Kvar minutoj, kiel lunde.

SABATE

12.30-12.40 Bern, kiel lunde.

20.00-20.20 Roma, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz). Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, Centro Corrispondenza, I-00100 Roma, Italio.

Sesfoje Bern, kiel merkredede.

DIMANĈE

01.15-01.25 Bern, (por Centra kaj Suda Ameriko) kiel ĵaŭde.

03.15-03.25 Bern, (por Norda Ameriko) kiel ĵaŭde.

04.05-04.30 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 21.85m (13730 kHz), 19.60m (15410 kHz). O.R.F., Esperanto-fako, A-1136 Wien, Aŭstrio.

08.00-08.20 La Habana, (por Norda Ameriko kaj Pacifiko) 25.35m (11835 kHz). Radio Habana Cuba, Esperanto-sekcio, Apartado 70-26, La Habana, Kubo.

09.20-09.30 Tallinn, kiel ĵaŭde.

13.05-13.30 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 25.47m (11780 kHz), 21.85m (13730 kHz), 19.42m (15450 kHz).

17.00-17.30 La Habana, (por Ameriko) 25.51m (11760 kHz), 25.26m (11835 kHz), 19.46m (15415 kHz), 16.90m (17750 kHz), 16.86m (17795 kHz).

18.30-19.00 La Habana, (por Eŭropo) 25.10m (11950 kHz), 19.45m (15425 kHz), 16.88m (17770 kHz).

20.20-20.30 Vatikano, 570m (526 kHz), 196m (1530 kHz), 48.04m (6245 kHz), 41.38m (7250 kHz), 25.55m (11740 kHz), kaj FM 93.3 MHz, 105.0 MHz (anka en festotagoj).

22.45-23.00 Zagrebo, 262 m (1125 kHz, 1143 kHz, 1143 kHz), 11508 MHz. Radio Zagreb, Esperanto-fako, HRV-41000 Zagreb, Kroatio.

22.00-22.20 La Habana, (por Eŭropo) 19.45m (15425 kHz), 16.88m (17770 kHz).

22.30-23.00 La Habana, (por Ameriko) 31.19m (9620 kHz), 25.10m (11950 kHz), 19.50m (15385 kHz), 16.82m (17835 kHz).

DIREKTITAJ ONDOJ

Vieno: 15410 kHz al Proksima Oriento; 11780 kaj 15450 kHz al Malproksima Oriento.

ALIAJ STACIOJ

(regiona aŭdebleco; horoj la loka tempo)

Brasil: Sorocaba (ZYK669), 1080 kHz, sabate, 19.00-20.00h; Rio de Janeiro (ZYJ462), 1400 kHz, dimanĉe, 08.00-08.15h (Brazila Spiritisma Federacio), kaj merkredede 20.00-20.30;

Radio Libera Ondo, Trieste, FM 89 MHz, merkredede kaj vendrede 15.00-16.00 (Via Machiavelli 9, I-34100 Trieste, Italio.)

Radio FMR, Esperanto Redakcio, 9 bis av, Frédéric Estèbe, F-31200 Toulouse, Francio, 89.1 MHz, merkredede 13.00-14.00, vendrede 16.00-17.00.

Legu informojn pri la abono sur paĝo 6. Plenigu la abonilon kaj resendu ĝin al la reakcio.

Abonilo

Sendu ĝin rekte al la redakcio:
H-1675 Budapeŝt, Pk. 87, Hungario

Mi mendas la gazeton *EVENTOJ* por la jaro 1992 surface aĉre

Antaŭnomo: Nomo:

Poŝta adreso:

Lando:

Mi sendis la sumon en valuto:

rekte al la redakcio ————— perbanke

al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

al landa kotizperanto, konkrete:

Proksimaj landatoj

15.04-21.04, **La Salle (Aosta), Italio**, 15-a Internacia Junulara Festivalo,

30.04-05.05.92, **Latvio** Latvia Internacia Printempo (LIP-92), sur p. 7.

31 de marto, **limdato por Belartaj Konkursoj** de UEA en 1992, sur p. 4.

1-a de aprilo, **aliĝo al la UK, Vieno**, venonta kategorio nur surloke.

17-20 aprilo **PASKO(?)**, Sandra van de Hoef, Spijkerpad 89, NL-7415 AT Deventer, Nederlando, Tel: (+31) 5700 30571,

18-a de marto, **aliĝo al Berlina Arbara Renkontiĝo 24.04-03.05**, por eksterlandanoj rabato 20-100(!)% depende de lando, Michael Peters, Steglitzer Damm 32, D-Berlin 41, Germanio, Tel: (+49-30) 7969740

17-20 aprilo, **SAT-amikara kongreso**, Simone Bernard, 171, rue Raymond-Poincaré, F-33110 Le Bouscat, Francio.

23-27 marto, **Internacia Konferenco de AIS** en Karla universitato en Prago, sur p. 6.

27.03.-04.04. AIS provsesio, apud Prago, sur p. 6.